




Sen Rodin

Bildoj pri Norda Lando
kaj
aliaj rakontoj

FEL



Bildoj pri Norda Lando kaj aliaj rakontoj

BILDOJ PRI NORDA LANDO

kaj aliaj rakontoj

Sen Rodin

Bildoj pri Norda Lando

Flandra Esperanto-Ligo

Serio Stafeto n-ro 30



Tiu ĉi prov-libro estas libere kopiebla kaj transdonebla al ĉiu ajn.

Al Emi Uccelli-Gravone animfratino, aŭtorino de la lasta frazo

Inter Nordo kaj Sudo, impresoj de Mezlandano

Sur mia skribtablo kuŝas, kiel submanaĵo, mapo de Eŭropo. Kiel kutime ĉe la supra rando kuŝas nordaj landoj, ĉe la malsupra sudaj. Kaj inter la submanaĵo kaj mi estas manuskripto kun bildoj pri norda lando, sendita de iu italo. Se mi pensas pri norda lando ne venas en mia kapo bildo de Milano, kvankam por sud-italo ĝi ja kuŝas norde sed de Islanda pejzaĝo aŭ de Gällivare aŭ eĉ de Norda Kabo, lokoj kie mi iam, kun granda feliĉo, travivis belegajn feriajn semajnojn. Sed rapide solviĝas la enigmo; temas pri itala esperantisto, kiu serĉas kaj trovas novan feliĉon en Skandinavio. Lian novan amon oni daŭre sentas, same kiel oni, mezvoje inter Italio kaj Svedio, komence de majo – ĉar ĉijare la naturo malfruas je du semajnoj pro longa malvarmo – ĝuas la apenaŭ rimarkeblan subtilan aromon de la blua nuboj de arbarhiacintoj dum promeno en arbaroj.

En Svedio li konatiĝas kun la tiea speciala kaŝita pensmaniero pri la homa vivo. Ĝi esprimiĝas plurmaniere en la beletro: poezio, romanoj, filmoj. Tiel en “Somero el amo” de Ingmar Bergman, en “Ŝi dancis nur unu someron” de Arne Mattsson, ravaj filmoj; sennombraj romanoj, kiel “La loĝantoj de Hemsö”, de Aŭgust Strindberg. La sveda somero, intense poezia, lirika, mirinda, sed tre mallonga, tie simboligas la junecan amsezonon per sia reviga-iluziiga promeso de senfina feliĉo (legu “Forveturo”), sed baldaŭ ĝin viŝas la vintro, longa, silenta, morna, glacia. Tiel analoge la svedo - ĝuanta somere-junece la plej vastan liberon - ĵus akirinte diplomon kaj komencinte karieron rapide transformiĝas en rutinulon ĉenatan al la vivodevoj: jen la “vintro”. Jes, tiel okazas proksimume al ĉiuj homoj sur la tero, sed en Skandinavio oni sentas tion multpli intense ol aliloke, kaŭze de la drama kontrasto inter la belega mallonga somero kaj la pezega, senfina vintro.

La tuta bildaro aludas al tio ĉi. La preme minaca vintra silento; la iluzia fuĝo en sektojn, ritojn, alkoholon; la monotona senelira rutinado; la “amorcelebro” de gesinjoroj Gust; la obseda nokto; la foresto de la suno kaj de ĉia koloro; la regula sabata drinkado; la studentoj de la Unua de Majo; la fino: “Neniam plu oni aludos pri tio ĉi: bagatela vivepizodo

baldaŭ forgesota. Kerstin iĝis virino. La vintro superŝvebas. La aŭtoro profunde amas Svedion; li profunde amis Kerstin. Mian enkondukon mi skribas en majtago, la Tago de la (sanktaj) Laboro. La bildoj ankaŭ ne traktas feriadon, sed priskribas ĉiutagan laboron, veran vivon.

En la aliaj rakontoj... tiom da variaj gemoj estas ke oni vojaĝas tra ĉiuj regionoj de la homa spertado, ankaŭ la militon oni renkontas, kaj la mondo ankoraŭ multe plivastiĝas. Post legado de iu ajn unua paragrafo de nova "rakonto" oni tuj kaptiĝas tiel ke oni ne formetos la libron antaŭ la fino de la epizodo. Ne nur tristaj aspektoj aperas sed ankaŭ priskriĝas, jubile, kiel klara katastrofo povas per insista volo transformiĝi en jubilan halelujon. (Legu la brilan "Bulgaroj en Venecio"). En tiu rakonto ankaŭ evidentiĝas ke la aŭtoro havas profesion muzikan konon. Variado ne estas nur en la temoj sed ankaŭ en la stilo. Subtile vualas kaj prisorĉas la magian realismon de "La Plonĝo" kaj amuzas la humanisman anekdotismon de "La Negro".

Pri la aŭtoro malmulte estas konata. Li ne estas nova stelo al la verda firmamento, ĉar jam en la jaro 1960a kelkaj partoj el la bildoj estis publikigitaj en la Nica Literatura Revuo. Gaston Waringhien (Varingjeno) multe aprezis la stilon de Sen Rodin kaj li ankaŭ sugestis al Régulo Perez ke li eldonu la "Bildoj pri norda lando" en la Serio Stafeto. Principe estis antaŭvidita tiu eldono, sed pro la morto de Régulo ĝi ne realiĝis. Estas do tre bona afero ke nun ĝi tamen estas envicigita en la nova "Stafeto" kaj tiel povas simboligi kontinuecon de la Esperanta tradicio.

Estas ankaŭ klare ke la aŭtoro uzas esperanton kiel familian lingvon. Pure fundamenta klasika, flua, matura kaj natura ĝi estas sen ia ajn manierismo aŭ bezono de eksperimentoj aŭ barokaj ornamaĵoj. Sed tamen estas lingvo de persono, de individuo kun propraj karakterizoj, sed tiujn la leganto mem elfosu se li deziras tion fari.

Kiam mi fermis la dosierujon kun la manuskripto mi sentis min pli feliĉa, pli gaja ol antaŭe, kaj ankaŭ pli vasta, eble iom pli "senrodina" ĉar mi havis la impreson ke daŭre la tuta mondo apartenas al ni.

petro desmet'

1.05.2006

Bildoj pri Norda lando

1. Somera manĝejo

aŭgusto

La popola manĝejo situas en strateto kovrita de lignaj pasejetoj por piedirantoj kaŭze de pavimriparado. Ĝia fasado ne distingiĝas disde ĉiuj aliaj: miksaĵo baroka-empiro-liberty, dubeverda farbeto kaj multkolora flagetaro – etiketa insigno por hoteloj kaj gastejoj.

Sur la ŝtuparo kunpremiĝas plurlanda junularo. Elfrotitaj tornistroj viciĝas laŭ la vandoj. La incitoj vestas trivite fetorete; ili alvenas ĉi tien, vane serĉinte someran laboron en la apudaj ĉefurboj. Ili babilas pri knabinoj, laborebloj, tagsalajroj, restadpermesoj, jam tre informitaj pri ĉio, kvazaŭ ili loĝus tie ĉi ekde jaroj. Ili planas la posttagmezon: kie serĉi laboron? kie trovi dormejon? Kiam la mono estos elĉerpita kaj paĉjo rifuzos novan poŝtĉekon, ili turniĝos al la respektivaj konsulejoj, kiuj ilin reekspedos hejmen post oportuna taŭzado.

Vidiĝas ankaŭ flavbekuloj. Iliajn okulojn markas la elreviga miro kiu kaptis ilin je la alveno, kiam la griza urbo de la realo montriĝis tiom diferenca disde la miraĝa urbo de la priskriboj. Oni facile distingas ĉi novicojn de la somera vagabondado: ili gape obeeme aŭskultas la instrukciojn de la spertuloj.

Nokte, ne povante permesi al si liton en gastejo, ili ĉiuj dormas kune, majstroj kaj disĉiploj, sur la benkoj de la stacidomo. Ĉe iliaj piedoj pufaj tornistroj kuŝas surplanke.

Ĉe la centra servotablo blonda kelnerino kompetente mastrumas. Dekstramane kulerego, maldekstre forko; per aŭtomataj gestoj ŝi plenigas la prezentatajn telerojn. Surtablo tronas elektra varmigilo ŝarĝita per kolosaj potoj. Kiam ili estas elĉerpiĝontaj la blondulino fajfas; tuj de la

kuirejo alvenas kolegino kiu ilin anstataŭigas. Malsataj junuloj atendas kun levitaj teleroj kaj rigardoj humidaj pro malsato.

Teleregoj kun rizosalato, supuoj el tomatoj, pletoj kun bolitaj piroj, stakoj da grizaj platkukoj, terpomoj je butero, bovaĵo kun cepetoj en dolĉacida saŭco ĉirkaŭvagas ĉiudirekten, subtenataj de la plej bizaraj vaguloj de la eŭropa faŭno. Ili paŝas singardeme serpentumante inter la homamaso por ne renversi la ujojn, karesante per malsataj rigardoj la manĝaĵojn en ŝancela ekvilibro.

Pleniginte la telerojn oni serĉas sidlokon: dua etapo, plej malfacila. Dekstre kaj maldekstre viciĝas negrandaj manĝoĉambroj preskaŭ plenŝutitaj. En la unua, adoleskaj sudulo kaj nordulino sidas apud fenestro; ĉe proksima tableto korpulenta egiptano ruĝkolora pro sangopremo. La suda junulo silente premas la manon de la knabino; nun li deziras fumi sed, ne trovante fajrilon, petas alumeton de la egiptano. La barelulo pene levas la kapon, enŝovas manon en pantalonpoŝon kaj malvolonte prezentas skatoleton. Sed tordiĝante li ekvidas la knabinon. Tiam li komplete turniĝas pene pivotante sur la seĝo kaj ekparolas kun la geknaboj en kripla anglafranca ĵargono; poste li alparolas nur ŝin, kiu malatente respondas. Li leviĝas, falsidiĝas sur la seĝon fronte al la nordulino, sin prezentas kaj parolas parolas apenaŭ kompreneble kun fervora esperoplena persisto. Sed nun la sudulo ekparolas siavice preskaŭ distre:

«Kerstin, ni devus foriri...»

Ŝi tuj leviĝas senĝene, afable salutas la grasulon kiu komence ne komprenas, poste rapidas proponi sian aŭton por ilin veturigi kien ajn ili deziras. Ŝi afable rifuzas. Tiam la dikventrulo faras lastan provon: li petas ŝian adreson. La knabino ridas: ŝi loĝas iom malproksime, mil kilometrojn norde, apud la arkta cirklo, kaj forvojaĝos post kelkaj tagoj....

La gejunuloj eliras, la grasulo restas, stulte grimacanta.

Oni pagas nur je la eliro: po du kronojn por persono, manĝinte laŭvole.

Kelkaj el la plej senperspektivaj somervaguloj alvenas je la deka matene, kiam la restoracio malfermiĝas. Ili kunportas ĵurnalfaskon kaj restas, trankvile manĝante kaj legante, ĝis la sesa posttagmeze, tiel forlekante tri manĝojn per du kronoj.

Sur la ŝtuparo pasas ankaŭ tute alispeca ularo: civitanoj irantaj al komunuma oficejo ĉe la supra etaĝo. Urbanoj magraj, altstaturaj, iom rigidmovaj, kun subtila hela hararo, timidaj klaraj okuloj kaj papiliaj kravatetoj. Ĉiuj sanaspektaj, diskretaj kaj iom embarasitaj. Ili parolas mallaŭte, afable, kun la tipa kantilena intonacio de sia lingvo. Temas pri la indiĝenoj.

Sur la stratoj oni promenas pene en la oleeca turisma somera atmosfero de ĉiu ĉefurbo. Etoso odoranta je efemero, ŝvito, artifikeco.

2. Forveturo

septembro

Post dumonata restado en la norda lando Vito jam revenis hejmen. Dum la lastaj tagoj li estis revinta resti por ĉiam en la nordo. Tie li laboris en farmo apud la ĉefurbo, tie li enamiĝis al Kerstin. Kiom da posttagmezoj pasigitaj kun ŝi sur la lagbordo! Kiom da absurdaj aerkasteloj, kiam ŝi devis reiri al sia urbeto en la fora nordo, ne malproksime de la arkta poluscirklo! Li promesis, ke li reatingos ŝin tie. Post lasta saluto en la stacidomo la trajno forportis ŝin, susurglitante sur la reloj. Kaj li restis sola. La leteroj de Kerstin ripetis: “Mi vin atendas, venu baldaŭ”.

Sed leteroj alvenis ankaŭ de lia suda lando: de la patrino, kaj pli ofte de la preskaŭ-fianĉino. Ŝi skribis: “Via ĉambro estas en ordo. La rezervigo de la ekonomia apartamento estas akceptita de la studestra oficejo: baldaŭ nia dometo estos preta! La unua kunsido de la instruistoj en via lernejo okazos je la 22^a de septembro. Ni atendas vin”. Tro multajn aferojn oni devus forlasi por la eta Kerstin.

Dum la lastaj tagoj ĉio disvolviĝis kvazaŭ ekster lia volo. Iun tagon li sentis sin certa pri sia firma decido: li restos en la nordo dum la tuta vivo. La oblikva suno karesis rustajn arbojn; imagoj de Kerstin ĉirkaŭŝvebis flustrante “mi vin atendas”.

La postan tagon li forveturis suden. Verŝajne decidigis lin la lasta registrita letero de la patrino: “Ni atendas vin en la stacidomo je la 9^a de septembro. Trafu la internacian trajnon forveturontan de la ĉefurbo la 8an je la 17^a horo. Atentu, ni detale informiĝis. La sidloko estas jam fiksita: jene mi kunsendas la bileton”.

Revekiĝo post longa revado, salto en la realon post dumonata fabelo. Lin atendas lernejo, universitato, probabla edziĝo, ekonomia dometo, multaj filoj. Ĉio jam programita por li.

Li forveturis, sentante sin mekanismo perfekte muntita. La senfinaj horoj de la vojaĝo restos por ĉiam en li kiel koŝmaro. Li apatie aŭskultis la ritman frapadon de la radoj kaj, ne kapablante direkti siajn pensojn, lasis ilin vagadi kiel la bizaraj fumnuboj ŝvebantaj super la kapo de la kunvojaĝantoj.

En la suda stacidomo atendis lin la patrino, la fratino, la bofrato. Kisoj, brakumoj, ekkrioj. Nun li devas vole-nevole moviĝi, sin montri gaja kaj respondi al sinsekvaj demandoj. Ĉion li faras preskaŭ plezure: tiel li sin defendas de la alvenonta malespero. Pli bone prokrasti.

Oni ameme gvidas lin, brakenbrake, laŭ la stratetoj de la provinca urbo. Oni parolas parolas parolas, ĉiuj ĝojas.

La aero varmetas; el la tegmentoj malsuprenlitas pigra aerfluo lekanta kadukajn fasadojn. Personoj promenas, la butikvitrinoj fermiĝas, la propriuloj kun blankaj kiteloj staras ĉe la sojloj. En la restanta varmo de mortanta somero ŝvebas haladzo el putraĵoj, el mola asfalto kaj ŝtonpavima polvo.

Kaj jen la ĉiama strateto. La ĉiamaj domoj, la vilaeto kun bojanta hundo, la apuda kun malva verando. La parencoj senĉese babilas. Strange, li iam pensis, ke li ne plu travivos ĉion ĉi.

«Ĉu vi vidas, fine oni asfaltis la trotuaron! Ĝuste antaŭ du semajnoj, post dujara postulado! Persona sukceso de s.ro Morŭeti, kiu laŭte protestis antaŭ la oficistoj de la Urbodomo. Komence ili arogante respondis... sed li kuraĝe replikis...»

Ili atingas la enirpordon, li ekrimarkas novaĵon: oni forprenis la brilan latunan ŝildon de la patro, forpasinta la antaŭan jaron. Ŝildo gravurita: "Doktoro Regulo Rufuti, kuracisto-ĥirurgo, ambulatorio h. 9-11, 16-18" Kaptinte lian rigardon la patrino vespiras.

En la apartamento oni igas lin ĉirkaŭiri la ĉambrojn, ke li observu ĉiujn novaĵojn. Pli malfrue oni sidas ĉetable, babiloj senhalte viciĝas, fine oni lasas lin sola en lia ĉambreto kaj la patrino salutas: «Voku min kiam vi kuŝos, ke mi venu subŝovi la kovrilojn!»

Li staras meze de la ĉambro, aŭskultante la voĉojn de la loĝejo. La necesejo de la supra etaĝo malpleniĝas gargarbrue, infano lamentas, la patrino malpeze trotetas en la koridoro.

Jen mi tie ĉi, li pensas: la frazo ĉion resumas kiel verdikto. Li sinĵetas surliten kaj mordas la tukon. Li sentas sin detranĉita. Kerstin lin atendas tie, en senlima malproksimo. Momente li revidas la mildan ebenaĵon de la pala nordo, li revivas la lastajn tagojn kun ŝi, tro rapide, tro malatente spertitajn. Nenio fareblas jam. Kerstin ankoraŭ ne scias. Ŝi plu atendas lin semajnlonge; poste ŝi ricevos la unuan leteron de tie ĉi; ŝi ne respondos; verŝajne ankaŭ ŝi scias, ke temis nur pri somera flirto: kiu necese finiĝos kiel ĉiuj normalaj flirtoj. Nenio eksterordinara.

Li kuŝas senmova kun sekaj okuloj. Jam aliajn fojojn li tiel suferis, sed post nemulte la doloro fandiĝis en varman humidan fluon. Nun male io ŝirboras interne sed larmoj forestas.

Ĉio neripareble finiĝis. Subite li ekmemoras. Antaŭ multaj jaroj okazis io simila. Li estis naŭ aŭ dekjara. Dum monatoj li sopiris pri kanoneto ekspoziciita en vitrino de la plej luksa urba ludilbutiko. Fine, post persista petado, li ĝin ricevis donace por sia naskiĝtago. Sed pro momenta koleriĝo li rabie ĵetis la ludilon kontraŭ vandon, ĝin disrompante en du pecojn. Tiam li zorge kaŝis la objekton sur breton, malantaŭ vicon da libroj, kaj taglonge li preĝadis “faru, ke tio estu sonĝo; faru, ke mi retrovu ĝin integra”. Vespere, kun batanta koro, li malrapide delokigis la librojn. La kanoneto kuŝis tie, senhelpe frakasita.

Tiam li streĉe ekpensas “vere, kio distingas sonĝo disde realo? ĉio povus esti nur inkubo; povus esti, ke mi neniam revenis de la nordo... povus esti, povus esti, kial ne?...”

Sed ĉiuj hejmaj objektoj vicigitaj laŭ la vandoj, ĉiuj rutinaj bruetoj reasertas: senutile, vi ne plu reiros tien, ni tenas vin. Kial vi forveturis? Nenio en la mondo povas retroiri.

Dum li tiel senespere fantaziumas, intermite li remalfermas la okulojn, kaj tuj kruele li ekvidas la vestoŝrankon kun la kutima eterna makulita spegulo, kaj la tapiŝeton zorge trikitan de la patrino, kaj la skribotablon kun la eluzita latin-vortaro. Li tro bone scias, kion li revidos. Oni ne povas

erari. Baldaŭ la ludo elĉerpas lin, liaj pensoj svenas en nebulo.

—

Ankoraŭfoje li malfermis la okulojn kaj senmoviĝis pro miro. Nun estis pli malhele, kun diferenca nuanco. Febla lumo filtriĝis el ekstere tra malpura kurteneto. Li troviĝis en niĉo el bruna kruda ligno, dekstraflanke malfermita al malpuraĉa ĉambrego dissemita je botoj, ŝtrumpoj, tornistroj. Aŭdiĝis peza regula spirado, kvazaŭ de laca bestaro.

La pensoj, komence glaciigintaj, poiome ekruĝiĝis alprenante konturojn. Li sukcesis kapti unu el ili, kiu ene kriis “do, mi estas ankoraŭ tie ĉi!” Tuj li intense ektimis, ke se li fermos la okulojn, poste, remalfermante ilin, li refoje vidos la ordan ĉambreton kaj la tapiŝeton kaj la vestoŝrankon. Li decidis elprovi alimaniere: singarde li etendis la manon kaj karesis la lignon de la kuŝejo. Sentante ĝin solida kaj varmeta sub la tuŝo, li premis pli energie, ĝis la fingroj ekdoloris. Li avide aŭskultis la spirojn, observis la objektojn sur la planko. Malpura franĝo de kovrilo pendanta de la supra kuŝejo flirtis ĉe lia vizaĝo. Li ĝin prenis kaj per ĝi frotis siajn frunton kaj vangojn, moviĝante singardeme sur la malmola ligna liteto, por ĝin senti solida, masiva sub la dorso. En la granda silento tiktako de vekhorloĝo reliefiĝis kaj kaptis lian atenton. “Mi metis ĝin tien hieraŭ vespere” li pensis, kaj ondo el subita emocio invadis lin.

La dormejo vivis sian vivon realan fetoran mirindan. La laborkamaradoj peze dormis. La pordo fronte al fenestreto estis duone malfermita, distordita botaĉo staris en angulo, sferaj buletoj el lanugo glitkuris sur la planko. En la duetaĝaj kuŝejoj ronkis la rikanoj, la kvereloj, la amoroj de la farmolaboristoj kun apatiaj mienoj kaj duonmalfermitaj buŝoj. La tola lustro iom pendolis.

Vito ne plu eltenis. Li rapide leviĝis; el tiu malhela paradizo li kuris eksteren, en la perlecan lumon de septembra mateno.

Malalta suno duonkaŝiĝis kiel kotonbulo malantaŭ nubkurteno. Piĝame vestita Vito sinĵetis sur la herbon kaj vive ĝuis sentante ĝin malvarmeta sub sia korpo. Li ruliĝis, rigardis soife la palan ĉielon, la ebenan teron, la lignan barakon, la vicojn da betuloj. Li frotis la teron per la manoj,

plenbuŝe mordis la herbon; ĉio por senti pli intense, ke li estas ĝuste tie ĉi, vere tie ĉi.

La postan tagon Vito forveturis al la fora nordo.

3. Junulargastejo

septembro

En la restadejo troviĝas ses personoj. Tri knabinoj sidas ĉirkaŭ tableto. Du el ili dense flustre babilas pri la urbo, pri la antaŭfiksitaj itineroj. Ili vestas striktajn pantalonojn kaj plurkolorajn bluzetojn. La tria knabino dormas kun kapo apogita sur la antaŭbrakoj.

Ĉe alia tableto juna germano kun mefistofela vizaĝo kaj velura jako estas absorbita super ŝaktabulo. Antaŭ li kuŝas malfermita gazeto. Li atente ekzamenas ĝin, poste observas la ŝaktabulon, delikate tuŝas kurieron kaj perplekse haltas, karesante sian mentonon per svelta mano.

Antaŭ vertikala fortepiano knabo pigre muelas klavojn serĉante arion. Li ekludas mezuron, mispaŝas, rekomencas. Disaj tonoj, orelŝiraj agordoj vagas tra la salono. Neniu atentus.

Sed la plej interesa ulo sidas en angulo de la ĉambro sur seĝorando. Liaj kruroj interkruciĝas; antaŭbrako apogita sur genuo subtenas lian mentonon; liaj okuloj estas duonfermitaj: intermite li eĉ pli premfermetas ilin por kapti aparte delikatajn apartaĵon de tio, kion li estas ekzamenanta. Tiam li etendas la dekstran brakon kaj kurioze gestas: dum la dikfingro glitas laŭ la streĉita montrofingro, li turnas la manon ĉiudirekten, ĝin tordas kaj retordas. Li iom klinas la kapon flanken. Fine li revenas al la antaŭa hieratika pozo.

Sur alia seĝo, je kelkmetra distanco, plurkolora kartono kovrita de ruĝaj bluaj oranĝkoloraj strekoj kaj makuletoj, estas apogita al la seĝodorso. Evidente abstrakta kolorisma kreaĵo.

La pentristo ekstaras, proksimiĝas al la pentrostablo, turnas la kartonon je naŭdek gradoj kaj ĝin reapogas al la seĝodorso; poste li residiĝas kaj replonĝas en sian meditado.

—

Vintre la saloneto estas dezerta kaj glacia. Flavaj disĉifitaj ĵurnalpaĝoj ŝirmas la fenestrojn; ĉion kovras densa tavolo el polvo. La junulargastejo restas fermita ekde oktobro ĝis aprilo. Surplanke kuŝas eluzita kartonpeco preskaŭ sufokita sub polvo. Temas pri la iama kolorisma kreaĵo de la abstrakta artisto. Nur tio restas de li.

4. La traïro

septembro

Tiun matenon Kerstin estis okupata en la seminarejo, do Vito iris sola viziti la centron de la urbeto. Lin tiklis scivolemo pri domoj kaj fenestroj.

De post lia alveno norden du aspektoj logis lian atenton: la ĉieestantaj duetaĝaj dometoj el ligno plaĉe farbitaj paŝtelnuance, kaj la kompleta manko de fenestroŝutroj. Vespere ĉiuj fasadoj elmontris vicojn da lumaj kadroj pendantaj enaere, interne garnitaj per blankaj kurtenetoj; nenie oni povis malkovri fenestron blindigita per opaka materialo. Ne nur mankis la normalaj unu- aŭ dupecaj ŝutroj tiel komunaj en la sudo, sed forestis ia ajn speco de nevitra fenestrofermilo, kiel persienoj, ĵaluzioj, klapoj kaj similaj gardiloj de la hejma sekureco, kiuj en lia lando okupas gravan kategorion de laboristoj. Kiamaniere tie ĉi oni defendas sin de frakasistoj ŝtelistoj rabistoj murdistoj? Ĉu oni tiom fidus unuj la aliajn?

Kiam li proponis la demandon al Kerstin, ŝi mokridete respondis: «Karulo, vi vidis tro multe da usonaj gangsterfilmoj», kaj li ne kuraĝis plu enketi.

Jen kial tiun matenon li direktiĝis al la urbocentro kun du atendoj: vidi domojn el brikoj, vidi fenestroŝutrojn.

La unua atendo estis parte kontentigita: dum li proksimiĝis al la urbocentro laŭ Reĝostrato, kvankam ankoraŭ la domoj plejmulte estis lignaj, tamen ie-tie aperis iu domo el brikoj, tri- aŭ eĉ kvaretaĝa, kutime kun vendeja vitrino teretaĝe. Sed pri fenestroŝutroj: nenia signo. Evidente la indiĝenoj tenace rifuzas fermi siajn fenestrojn per io ajn alia, ol per simpla, pura, travidebla vitro kaj elegantaj kurtenetoj.

Ju pli li proksimiĝis al la urbocentro des pli la trafiko pliintensiĝis, sed jen alia miriga aspekto: ĉiuj aŭtoj, kamionetoj, motorcikloj veturis flustre kun surpriza malhasto, proksimume je bicikla rapido. Vito, kutimiĝinta al la rapidega kaosa surdiga trafiko de sia suda urbo, kie la stratindikiloj “50 Km” estas universale ignorataj, havis la impreson spekti sciencfikcian filmon, kie ĉio moviĝas bremsata de iu magneta flukso nevideble ŝvebanta enaere. En tia duonsilenta, kvieta etoso eĉ la piedirantoj ŝajnas moviĝi trankvile, malstreĉite, sen tiu nervoza rapidemo kiu pelas la homojn al preskaŭa kurado tra la bruegaj sudaj stratoj. Jes, promeni tie ĉi estas ja pli kontentige, pensis Vito, sed... sed kiamaniere oni plenumas ĉiujn siajn taskojn, moviĝante kiel testudoj? Li pridemandos al Kerstin.

Tiel observante kaj cerbumante Vito atingis la centran placon kaj jen, fine li povis admiri la Urbodomon. Ĝi estis vere agrabla, kun siaj kvar etaĝoj el brikoj, kun la granda murhorloĝo, kun la du turetoj ĝin flankantaj kvazaŭ flegistoj. Ĝi perfekte harmoniiĝis kun la ĉirkaŭanta domaro, kiun ĝi neniel superregis sed ŝajne akompanis kiel pliaĝa frato.

Vito longe observadis ĝin starante sur la trotuarrando, kiam eta “PEE” de aŭtokorno altiris lian atenton. Tiam li surprize konstatis, ke aŭto haltis iom antaŭ la loko kie li staris; tra ĝia glaco vidiĝis bontona stiristo, kiu elokvente gestis por inviti lin trairi la ŝoseon. Evidente li kredis, ke Vito estas traironta, kaj haltis por doni al li la pasrajton.

Vito ŝtonmiris, sed rapidis trairi la ŝoseon; dum li pasis antaŭ la aŭto la ridetanta stiristo direktis al li afablan mansaluton.

5. Ĉapelo

oktobro

Hieraŭ vespere Nisse, dekkvarjara, akceptis hejmen amikon dekvinjara.

Al Nisse, okaze de lia naskiĝa datreveno, la gepatroj donacis la unuan aŭtentikan viran ĉapelon. Tial li petis tujan helpon de la pli sperta amiko, por havigi al ĝi la konvenan formon laŭ la liceaj reguloj.

Ili ŝaltis la elektran forneton kaj surmetis poton da akvo. Sur la kuireja tablo tronas la ĉapelo de la amiko, utilonta kiel modelo.

Kiam la akvo ekbolas, la amiko delikate prenas fingropinte la novan ĉapelon kaj ekmanipulas ĝin. Li mienas tre absorbite. Pridemandite, li apenaŭ respondas. Post kompleksaj manovroj li eksponas la ĉapelon al la vaporo elvenanta de la poto, kaj ĝin zorge modeligas; li starigas ĝin ĉe la sian, malproksimiĝas je kelkaj paŝoj, atente observas la diferencojn kaj rekomencas la modladon. Tiamaniere li longe laboradas mute, dum la gastiganto seriozmiene sekvas ĉiun lian movon.

«Ĉu ne ŝajnas, ke la ĉirkaŭrando de la via elstaras iomete pli ĉe la dekstra flanko?» li demandas timide.

Post kiam la spertulo foriris, Nisse restas duonhoron antaŭ la enireja spegulo por provi la gestadon. Li grimacas, iom turniĝas flanken por ekzameni la ĉirkaŭrandon, kliniĝas, antaŭensvingas la bruston, levas la manon kaj per la pintoj de la montra- kaj meza fingroj kunigitaj tuŝas precizan punkton de la rando egaldistance inter la antaŭa kaj la dekstra ekstremaĵoj: tio estas la normala saluto por konatuloj, amikoj, samliceanoj.

Sed nun venas la plej malfacila parto, la provoj pri la etiketa aŭ galanta

saluto, rezervita al specialaj knabinoj, al sinjorinoj, lernejaj aŭtoritatoj kaj similaj gravuloj. Ilin ja necesas saluti per ia pompo, evitante neoportunan senĝenecon. Per tri fingroj de la dekstra mano Nisse delikate stringas la pruon de la ĉapelo kaj ĝin levas, zorgante ke la tuta rando restu horizontala kaj leviĝu samtempe. Malfacile scii, kiom ekzakte konvenas levi ĝin super la kapo. Verŝajne la mezuro dependas de la graveco de la renkontata persono. Post multaj provoj li decidas, ke morgaŭ li pritraktos la problemon kun la amikoj.

6. Dimanĉa ripozo

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be aŭ retpoŝte ĉe retbutiko@fel.esperanto.be.

7. Periferia preĝejo

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be aŭ retpoŝte ĉe retbutiko@fel.esperanto.be.

8. Aŭtuno

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be aŭ retpoŝte ĉe retbutiko@fel.esperanto.be.

9. Serena ĉielo

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be aŭ retpoŝte ĉe retbutiko@fel.esperanto.be.

10. Akcidento

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be aŭ retpoŝte ĉe retbutiko@fel.esperanto.be.

11. Sandgren

decembro

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be aŭ retpoŝte ĉe retbutiko@fel.esperanto.be.

12. Dimanĉo antaŭ Kristnasko

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be aŭ retpoŝte ĉe retbutiko@fel.esperanto.be.

13. La sekto

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be aŭ retpoŝte ĉe retbutiko@fel.esperanto.be.

14. Maldormo en la barako

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be aŭ retpoŝte ĉe retbutiko@fel.esperanto.be.

15. Skipestro Erik

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be aŭ retpoŝte ĉe retbutiko@fel.esperanto.be.

16. Demonstracia pisado

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be aŭ retpoŝte ĉe retbutiko@fel.esperanto.be.

17. Fiaskinta kverelo

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be aŭ retpoŝte ĉe retbutiko@fel.esperanto.be.

18. Revoj en la barako

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be aŭ retpoŝte ĉe retbutiko@fel.esperanto.be.

19. Tago en la segejo

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be aŭ retpoŝte ĉe retbutiko@fel.esperanto.be.

20. Letargio

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be aŭ retpoŝte ĉe retbutiko@fel.esperanto.be.

21. Neĝventego

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be aŭ retpoŝte ĉe retbutiko@fel.esperanto.be.

22. Gasta pisado

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be aŭ retpoŝte ĉe retbutiko@fel.esperanto.be.

23. Sabatvespera reveno

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be aŭ retpoŝte ĉe retbutiko@fel.esperanto.be.

24. Nokta glitveturado

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be aŭ retpoŝte ĉe retbutiko@fel.esperanto.be.

25. Amoro

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be aŭ retpoŝte ĉe retbutiko@fel.esperanto.be.

26. Monteto ĉe la norda kvartalo

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be aŭ retpoŝte ĉe retbutiko@fel.esperanto.be.

27. Direktoro Nikvist

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be aŭ retpoŝte ĉe retbutiko@fel.esperanto.be.

28. Tataro

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be aŭ retpoŝte ĉe retbutiko@fel.esperanto.be.

29. Stenbek

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be aŭ retpoŝte ĉe retbutiko@fel.esperanto.be.

30. Unua de majo

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be aŭ retpoŝte ĉe retbutiko@fel.esperanto.be.

31. Fino

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be aŭ retpoŝte ĉe retbutiko@fel.esperanto.be.

32. Smeraldo

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be aŭ retpoŝte ĉe retbutiko@fel.esperanto.be.

Aliaj rakontoj

La papera fuliko

rakonto

Kara Ajna,

ne, mi ne emas skribi por vi rakonton pri la temo “origamoj”. Mi simpatias al via asocio kaj al via baldaŭa kunveno, sed la penso skribi laŭteme forviŝas de mia menso ĉian ideon. Mi opinias, ke absoluta libero estas la kondiĉo necesa, kvankam ne sufiĉa, de Arto. Laŭ mi ĉiaj skemoj aŭ limigoj – formalaj, temaj, socipolitikaj, religiaj, ekonomikaj... – bremsas la estetikan esprimon. Jen kial estas por mi malfacile akcepti la ekziston de “origama arto”. Vi trudas al vi mem absurdajn memlezajn limigojn. Vi pretendas esprimi ion kaj krei memsufiĉajn strukturojn faldante plurangulajn paperpecojn, rifuzante tranĉi, glui, aldoni ion ajn. Via plej fama “artista”, Akira Yoshizawa, eĉ restas obstine fidela al la nura simpla kvadrato. Nu, kiu senco troviĝas en tiaj arbitraj reguloj?

Jes, vere, kelkfoje min surprizas iuj viaj verkoj. Tamen, se vi povus libere tranĉi, glui, luti, veldi, utiligi lignostrietojn, zinkumitajn dratetojn, polistirenajn platojn, kuprajn agrafojn, plastajn trabetojn, optikajn fibrojn, transistorojn, mikroĉipojn, unuvorte ĉion, kion disponigas al ni la modernaj teknologio kaj varoscienco, imagu kiajn ĉefverkojn vi povus krei! Eĉ Bach kaj Mozart estus ellaborintaj pli tiklajn muzikojn, se tiam ili disponus pri profesia muziksintezatoro aŭ almenaŭ pri elektrona klavaro! kaj imagu kiom da agrablaj verkoj estus skribintaj Homero, Dante, Shakespeare, utiligante profesion komputilon garnitan per adekvata skribprogramo Mikrosofta aŭ prefere Makintoŝa!

Tion sincere dirinte – kiel konvenas inter geamikoj – mi profitas por rakonti al vi iun strangan, iom konsternan okazaĵon, en kiu ankaŭ vi

havas difinitan rolon.

Vi certe memoras: kiam vi vizitis min en mia ermitejo, mi estis ĵus finkonstruinta malgrandan “bardan harpon”. Ĝi estas fidela kopio de la muzikilo de Brian Boru – la irlanda reĝo batalvenkita en 1014 far la dana armeo. Stranga reĝo tiu Boru! Li trairadis inkognite la irlandajn erikejojn portante surdorse sian amatan harpeton, kiun li utiligis ankaŭ kiel tornistron: en ĝian sonkeston li enmetis la malmultajn vestojn kaj proviantojn sufiĉantaj al li. Tiu lia muzikilo mirakle konserviĝis dum pli ol 900 jaroj kaj estas nun gardata en la Nacia Muzeo de Edinburgo. Ĝi havas kordojn el latuno kaj arĝento kiuj donas fascinan tintan sonorecon. Per la helpo de irlanda amiko mi sukcesis ricevi fotojn kaj mezurojn de la harpo, kiun mi kiel plej eble fidele reproduktis.

Kiel vi vidis, temas pri originala muzikilo. Dank’ al ĝia malgrandeco (95 cm.) oni povas ĝin ludi tenante ĝian sonkeston inter la genuoj, kun la bazo apogita al la suroj kaj la supro al la dekstra ŝultro. Fakte la ludisto strikte ĉirkaŭbrakas la muzikilon kaj vibras kun ĝi. Malgraŭ la modestaj dimensioj, la vibrado, kaŭze de la formo kaj de la materialo (ruĝa maskla abio), estas surprizige intensa.

Kiam vi alvenis, mi estis ĵus komencinta ekzerciĝi. Kompreneble mi neniel intencis atingi altan muziknivelon. La muzikilo estas diatona kaj disponas pri apenaŭ 30 kordoj: mi celis nur plenumi simplajn popolariojn, modestajn bagatelojn, en deca maniero.

Dum la tri tagoj kiam vi restis tie ĉi mi aŭdigis al vi nur kelkajn akordojn. La tempon plaĉe okupis viaj origamoj: la diablaĉo kun forko, la fajna pavo kun plenetendita vosto, kaj ĉefe la fuliko, de vi kreita per maldika nigra silkopapero. Eta objekto, sed ĉarma. Allogis min ĝia kaŝita eleganteco reliefiganta en duonlumo, se oni ĝin rigardis tra duonfermitaj palpebroj. Samkiel difinitaj modeloj de Yoshizawa ĝi ŝanceligis mian malaltan taksadon pri la origamoj. Jes, kelkfoje, sporade, iu origama verko povas flugtuŝi la veran Arton. Ĉiuokaze, ĉu arto aŭ nearto, via verketo plaĉis al mi. En specialaj kondiĉoj, dum la sunsubiro, kun svenanta lumo, ĝi kvazaŭ fandiĝis kun la violkolora vibranta reflekto de la horizonto. Kun la flugiloj etenditaj ambaŭflanken kaj la plata beko antaŭen, ĝi ŝajnis preta ekflugi.

De post via foriro la fuliko restis sur la mahagona skribotablo, teretaĝe. Dum la sekvantaj tagoj mi ekzerciĝis pri iu “Norda Ario”: malrapida, korraba melodio memoriganta la “Nordan Kanzonon” de Schumann en lia “Albumo por la junularo”. Kun takto 3/4, ĝi konsistas el nuraj akordoj en tonalo Do maĵora; la temon ekspozicias kvin mezuroj, entute naŭ akordoj. La kvara kaj kvina mezuroj enhavas po du akordojn: FA-LA-DO / LA-DO-FA-LA kaj DO-MI-SOL-DO / SOL-DO-MI-SOL. Akordoj kutimaj, sed iom malfacile plenumebraj per la harpeto. Tamen la fingroj poiome adaptiĝas al la sinsekvaj pozicioj kaj lernas agi sinkronie. Tiam la akordoj elvenas iom arpeĝitaj, plensonoraj, vibrigantaj la sonkeston. Pro tiu elfluo de perfektaj harmoniaj sonoj mi spertis ian sensan plezuron. La Norda Ario sonis ĉiam pli kontentige kaj ĉiam pli ravis min. Kutime mi ĝin ludis je la unua etaĝo, de kie oni plene ĝuas suden la vidon de la Apeninaj deklivoj.

Tagon, je la fino de septembro, ventflueto envenis tra la tegmenta fenestro, tial mi malsupreniris teretaĝen kaj sidiĝis antaŭ la skribotablo sur kiu troviĝis via fuliketo. Maldekstre de mi la malfermita fenestropordo rigardis norden al la pada ebenaĵo. Surfone, je granda distanco, la impona Alpa bastiono neĝkronata.

Estis la sepa horo de kvieta posttagmezo: aŭdiĝis nur malproksimaj birdaj pepoj. Mi ekludis la Nordan Arion kaj baldaŭ sukcesis plenumi ĝin je ĝusta takto kun adekvata esprimo.

Tiam ekresonis en mia memoro melodio kiun mi aŭdis antaŭ tridek jaroj en la fora nordo. En la perleca lumo de finsomera vespero mi sidis sur lagobordo kun Kerstin kaj grupeto da laponaj knabinoj. De proksima insuleto atingis nin lamentaj blekoj de fulikoj. La knabinoj ekkantis malnovan nordan amkanton kiu fandiĝis kun la fulika alvoko:

Jen mi lasas kelkajn florojn,
iom da rozoj al via zorg’;
sed ne estu
nun malgaja,
mia kara.

Ĉar la rozoj tie naskiĝas
en magia reĝa ĝarden',
kaj nur per glav'
oni povas ilin preni.
La unua blankas kiel neĝ',
kaj la dua ruĝas kiel sang',
sed la trian mi plej emas
al vi doni.
Ĝi floras ne jam nun,
antaŭ ol mortos la donant',
sed ĝi floras
tiam longtempe,
mia kara.

Mi perdiĝis en la memoraĵoj. Dum kelkaj minutoj mi restis senmova, rigardante la viol-lazurajn Alpojn, pripensante la personojn de foraj tempoj kaj landoj, la perditan harmonion de estingiĝinta pasinteco. Sed la duonrevo interrompiĝis kiam stranga apartaĵo altiris mian atenton: via fuliketo, kiu antaŭe situis centre de la skribotablo, nun troviĝis proksime de ĝia maldekstra rando. Mi ne memoris esti movinta ĝin, kaj neniu aerfluo trairis la ĉambron.

Post momenta perplekseco, mi ree ekludis la arion, sed ĉifoje sekvante per la okulflanko la fuliketon. Atinginte la kvaran kaj kvinan mezurojn, mi plenumis la akordojn, kun ritmo kaj esprimo tiel perfektaj kiel neniam antaŭe. Tiam, en ekzakta samtempeco kun la lasta akordo, la fuliketo, kvazaŭ atakata de subita aerfluo, ekvibris kaj intense luliĝis; tuj poste ĝi leviĝis en la aero, eliris kaj forflugis norden: rekte al la Alpoj!

Momente paralizita pro la surprizo, mi demetis planken la harpon kaj ĵetiĝis al la fenestropordo etendante la manojn... sed senutile: la fuliko jam estis transpasinta la rozujojn de la ĝardeno: baldaŭ ĝi iĝis nigra punkteto kaj malaperis en la ĉielo. De ĝi mi ne plu retrovis eĉ etan spuron.

Jen ĉio. Mi detale rakontis al vi la sinsekvon de la okazoj por eviti viajn klarigojn, kiajn "vi revis" aŭ "aerfluo forblovis la origamon" aŭ "vi estis

drinkinta”, aŭ similajn. Ne, la aero estis tute senmova kaj mi tute sobra kaj vigla, ĝuste kiel mi priskribis; cetere nenia klarigo povus kontentigi min, kiu plenkonscie travivis la sperton. Iu povus sugesti ke la fuliketo, fascinata de praa harmonio, strebis al siaj nordaj fratoj... sed tiajn esoterajn cerbumaĵojn mi rifuzas. Ne eblas! Ĉiosume ĝi estis ja peco el papero, kvankam entenanta ideon!

La sola konsekvenco de la epizodo: mi estas laŭgrade ŝanĝanta mian starpunkton koncerne al la origamoj, speciale al tiuj de vi faritaj. Jen kial mi petas vin: bonvolu sendi al mi alian fuliketon kiel plejeble similan al tiu, kiu nun malverŝajne ŝvebas kun siaj similuloj super fora norda lago. Mi sentas la mankon de via etulino.

En atendo mi ĉirkaŭbrakas vin.

La du kredoĵoj

rakonto

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be aŭ retpoŝte ĉe retbutiko@fel.esperanto.be.

Cikadino raĉenica

fabelo

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be aŭ retpoŝte ĉe retbutiko@fel.esperanto.be.

Bulgaroj en Venecio

raportaĵo

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be aŭ retpoŝte ĉe retbutiko@fel.esperanto.be.

Unua morto

rakonto

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be aŭ retpoŝte ĉe retbutiko@fel.esperanto.be.

Striko

rakonto

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be aŭ retpoŝte ĉe retbutiko@fel.esperanto.be.

Sagao de la fampiridoj

(aŭ pri la Hipokrata Ĵuro)

rakonto

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be aŭ retpoŝte ĉe retbutiko@fel.esperanto.be.

Fuĝanta kadavro

raportaĵo - nekredebla sed ebla

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be aŭ retpoŝte ĉe retbutiko@fel.esperanto.be.

Mariza

rakonto

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be aŭ retpoŝte ĉe retbutiko@fel.esperanto.be.

Negro iĝis nigrulo

rakonto

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be aŭ retpoŝte ĉe retbutiko@fel.esperanto.be.

Nobla sporto

raportaĵo

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be aŭ retpoŝte ĉe retbutiko@fel.esperanto.be.

Etaj geamikoj

dediĉitaj bildoj

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be aŭ retpoŝte ĉe retbutiko@fel.esperanto.be.

La fratoj leonoj

Sahara legendo

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be aŭ retpoŝte ĉe retbutiko@fel.esperanto.be.

Konfesoĵ

rakonto

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be aŭ retpoŝte ĉe retbutiko@fel.esperanto.be.

Belfagor

rakonto

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be aŭ retpoŝte ĉe retbutiko@fel.esperanto.be.

Belfagora standardo

daŭrigo

Oktobro 1995

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be aŭ retpoŝte ĉe retbutiko@fel.esperanto.be.

Konflikto inter viando kaj spinacoj

rakonto

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be aŭ retpoŝte ĉe retbutiko@fel.esperanto.be.

Geedziĝo kun pafo

rakonto

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be aŭ retpoŝte ĉe retbutiko@fel.esperanto.be.

La plonĝo

rakonto

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be aŭ retpoŝte ĉe retbutiko@fel.esperanto.be.

Kolofono

Titolo: Bildoj pri Norda Lando kaj aliaj rakontoj

Aŭtoro: Sen Rodin

Serio: Stafeto n-ro 30

Kovrilo: Julia Litvinova

Tekstaranĝo: Erik D'Hondt kaj Paŭl Peeraerts

ISBN: 978 90 77066 22 5

UDK: 82.3.892

NUR: 303

Leĝa depono: D/2006/2924/3

Flandra Esperanto-Ligo

Frankrijklei 140 - BE-2000 Antverpeno

www.retbutiko.be

© 2006 FEL, Antverpeno

Notoj

La notoj de tiu ĉi libro estas troveblaj nur en la plena versio. Ĝi estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be aŭ retpoŝte ĉe retbutiko@fel.esperanto.be.